

Nikolaus Lenau,
Velkinta rozo

tradukita de Manfred Retzlaff

En iu libro foliumis mi,
kaj estis en ĝi rozo-flor',
velkintis, dispremitis ĝi,
tuŝata estis mia kor'.

Sed kiu iam plukis ĝin?
Foriĝis longe la memor'.
Se iam iu amis min,
la amo iĝis longe for.

Aĥ, dum vespero pli kaj pli
disiĝas tute la memor',
kaj baldaŭ ne plu scios mi,
ĉu min aminta estis kor'.

Kaj pli kaj pli dum la vesper'
foriĝas ankaŭ la dolor',
finiĝas mia voj' sur ter',
kaj ĉesos bati mia kor'.

*Traduko de la Germana poemo "Welke Rose" de NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-12-21.*

MR-023-1 / Arg-566-1145 (2010-09-20 12:19:57)

Nikolaus Lenau,
Welke Rose

In einem Buche blätternd, fand
Ich eine Rose, welk, zerdrückt,
Und weiß auch nicht mehr, wessen Hand
Sie einst für mich gepflückt.

Ach, mehr und mehr im Abendhauch
Verweht Erinnerung; bald zerstiebt
Mein Erdenlos, dann weiß ich auch
Nicht mehr, wer mich geliebt.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22).*

Arg-566-1143 (2010-09-20 12:21:17)